# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Februaro : 5 2022

## NE AL MILITO !

Ofte, antaŭ ol iri antaŭen, estas necese memori pasintajn okazintaĵojn kaj ankaŭ kiel ili okazis kaj disvolviĝis. Pro tio, ĉi-numere ni ne sciigos pri ĵusaj juraj juĝoj, sed pri deklaro kiu metis la bazojn por revata paco en la tuta mondo post la dua mond-milito. Temas pri la antaŭparolo de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, proklamita en la jaro 1945, sed tute aktuala hodiaŭ.

### NI, LA POPOLOJ DE LA UNUIĜINTAJ NACIOJ

**FIRME DECIDITAJ, gardi generaciojn kontraŭ la plago de milito**, kiu dufoje dum nia vivotempo alportis nedireblan suferon al la homaro, denove konfirmi nian kredon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je digno kaj valoro de la homa persono, je la samrajteco de viro kaj virino kiel de ĉiuj nacioj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, krei kondiĉojn, sub kiuj justeco kaj la respekto al la devoj el traktatoj kaj aliaj fontoj de la popoljuro povas esti certigataj, antaŭenigi la socian progreson kaj pli bonan vivnivelon en pli granda libereco,

**KAJ POR TIUJ CELOJ praktiki toleremon kaj vivi kiel bonaj najbaroj kune en paco, unuigi niajn fortojn por gardi la mondan pacon kaj la internacian sekurecon,** adopti principojn kaj enkonduki metodojn kiuj garantiu, ke armforto estu aplikata jam nur en la komuna intereso kaj uzi internaciajn instituciojn por antaŭenigi la ekonomian kaj socian progreson de ĉiuj popoloj...



*Je la nomo de la Homaro*

*PACON !!!*

## KIO ESTAS LA INTERNACIA PUNA KORTUMO ?

Internacia Puna Kortumo (IPK) estas internacia jura instanco kreita de la Statuto de Romo en la jaro 1998, kiel konstanta tribunalo por serĉi, akuzi kaj juĝi homojn pro genocido, krimoj kontraŭ la Homaro kaj aliaj militkrimoj. Tiel, dum la Internacia Kortumo celas solvi disputojn inter landoj, IPK esploras kaj juĝas situaciojn kie homoj, ekz. politikistoj, militistoj aŭ aliaj, perfortis la internacian homaran juron. Tamen, estas necese averti, ke ne ĉiuj ŝtatoj el la internacia komunumo aliĝis al Statuto de Romo, tiel Usono, Rusio, Ĉinio kaj Barato, kaj kelkaj aliaj, ne agnoskas la jurisdikcion de la IPK.

La pristudado de IPK rilate konkretajn okazintaĵojn povas ekiĝi per tri malsimilaj vojoj:

- Kiam ŝtato-partio kiu subskribis la Statuton de Romo prezentas akuzon.
- Post peto de la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj.
- Pro la iniciatemo de la Persekutisto. La oficejo de Persekutisto estas sendependa fako en IPK, kies celo estas serĉi kaj persekuti pri krimoj.

Ĝis nun IPK ekigis oficialajn esploradojn pro eblaj deliktoj okazintaj en Burundo, Centr-Afrika Respubliko, Ebura Bordo, Sudano, Kartvelio, Kenjo, Libio, Malio, D.R. Kongo kaj Ugando. Entute 10.742 homoj estis esploritaj de la oficejo de la persekutisto, post denunco, el kiuj fine 1.740, ĉefe militistoj, estas punitaj de la Kortumo. Inter ili, la uganda Dominic Ongwen, kiu permesis murdojn de civiluloj, seksajn perfortojn kaj la konskripcion de infanoj. Pro ĉi tiuj deliktoj kontraŭ la Homaro, IPK kondamnis lin en la jaro 2021 al 25 jaroj da malliberigo.




**EL JURA VIDPUNKTO** estas nova podkasto de la hispana Alejandro Burgos Escalante, jur-studento kaj membro de IJEA, kiu celas diskonigi mallongajn informojn pri juraj temoj. Vi povos aŭskulti ĝin en:

https://open.spotify.com/show/7vZZgrVcfGeSMPKAECJzbp

# *Vorto de la Semajno*

**Akuzi:** (tr) Aserti iun, ke oni intence aŭ konscie plenumis ion riproĉindan aŭ punindan.

**Akuzo:** Tio, pri kio oni akuzas.

**Akuzanto:** Tiu, kiu akuzas

**Akuzito:** Tiu, kiu estas akuzita.


**Akuzisto:** Ŝtata oficisto, kiu en iuj landoj prezentas la akuzojn en kriminala proceso. Ankaŭ konata kiel "prokuroro".

**Misakuzi:** False, erare akuzi.

**Sinakuzi:** Spontanea akuzo de si mem.

Sinonimoj: *kulpigi, denunci, kalumnii.*

- *Vi ne devas akuzi iun, se vi ne havas kredeblajn provojn.*
- *La juĝisto rifuzis malverajn akuzojn.*
- *La akuzisto deklaris, ke el tiuj provoj estas logike pensi, ke la viktimo mortis post longtempa venenado.*
- *Post akuzo malvera, akuzito libera.*
- *Nazioj misakuzis judojn pro ĉiaj deliktoj.*
- *Granda kuraĝo estas bezonata, se iu faras publikan sinakuzon.*



*La prokuroro akuzas lin antaŭ la juĝistino pro grava delikto*